

**Kluba Programo:****majo:**

- 1 Heleno Fantom: *El la Maniko de Nia Libroretaro*.  
(ŝanĝo de la programo antaŭe anoncita)
- 8 Komuna Vespermanĝo – ĉe *Penderel's Oak*, Holborn  
(je propra kosto) – vidu apude
- 15 John Wells: *Lingva Seminario*  
(1800h: konsilantaro)
- 22 Klubanoj: *Prelegetoj* (temo: “Kiu besto vi ŝatus esti?”)
- 29 Stan Keable: *La frua vivo de Eŭgeno Lanti – fondinto de la laboristara esperantista movado*

**junio:**


- 5 Socia vespero
- 12 John Wells: *Lingva Seminario*  
(1800h: konsilantaro)
- 19 Promeno laŭ suda bordo de Tamizo – vidu malsupre  
(*en okazo de pluvo: Socia vespero*)
- 26 Socia vespero/Promeno laŭ Tamizo  
(*tiu, kiu ne okazis 19 junio*)

**julio:**

- 3 Diskuto: *Probablaj sekvoj de malfunkciego de interreto*

**Tamiza promeno (19 aŭ 26 junio):**

19.15 - Renkontiĝu sur la teraso ekster Royal Festival Hall je la unua etaĝo.  
Interne troviĝas senpagaj necesejoj, kaj kafejo, kiujn vi povos uzi dum vi atendas.

**Komuna vespermanĝo**

(kelkaj nepraj faktoj)

Dato: vendredo la 8a de majo

Horo: tablo mendita ek de 19:15, sed celu alveni iom pli frue.

Loko: en taverno Penderel's Oak, ĉe 283-288 High Holborn, WC1V 7HP


Kosto: dependas de vi mem – ĉiu mendos kaj pagos aparte.

Metroe: al Holborn aŭ Chancery Lane – ambaŭ situas proksime.

Buse: n-roj 8, 25 kaj 242 haltas en High Holborn (ĉe Brownlow St. aŭ Procter St.).  
N-roj 1, 59, 68, 91, 168, 171, 188, 243 kaj 521 haltas en Kingsway (ĉe Holborn Station).  
N-roj 19, 38, 55 kaj 243 haltas en Theobald's Road (ĉe Red Lion Square).

Nia klubejo en Camden estos nealirebla tiun vesperon.

Eĉ se vi ne anoncis vin antaŭ la limdato, tamen eble oni trovos por vi sidlokon.  
Informiĝu ĉe LEK-Sekretario Davido.



## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babilo.

Kutima programo:

18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,  
50-52 Camden Square, NW1 9XB  
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo London Overground: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close,  
Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray,  
11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB  
01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Matt Peperell, Olga Kerziouk, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek.sekretario@gmail.com;

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap\_esp-lek21@yahoo.co.uk,

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry\_page@btinternet.com, anica\_page@btinternet.com,

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Tiu ĉi skribaĵo estu relative mallonga, pro tiom da menciindaj aferoj aliloke en la Bulteno.

Unue, ni faru salutojn al tri ĵus elektitaj membroj de la Konsilantaro de LEK: **ROLAND ENGLAND**, **STAN KEABLE** kaj **DIANA ROBIN**. Gratulojn!

Due, preskaŭ precize nun okazas la 10-jara datreveno de la alveno de LEK al la Londona Irlanda Centro. Invitilo trovita en la kluba arĥivo mencias la daton de nia unua festo cxi tie – vendredo la 6a de majo 2005. Mirinde. Kiel oni diras, "Ja galopas la tempo!"

Trie, mi citu el la raporto de nia Esperanto-instruisto, **MAGNUS HENOCH**, pri sia Porkomencanta Kurso: "Mi ĝojas, ke plejmulte da jaŭdoj ĉe iu tablo de Sudborda Centro aŭdeblas Esperanto, la modestaj ekparolas pli lerte kaj la nesciantoj eklernas. Certe jaŭdoj ne estus tiom viglaj sen la kontribuo de **MARTENO MINIĤ** kiu plejparte prizorgas la progresantojn kaj **MATT PEPERELL** kiu foje alportas ludojn." Dankojn al ĉiuj tri!

Nu, tiom devas sufiĉi. Sed legu ĉion en la Bulteno - kaj partoprenu en kiel eble plej multaj el la allogaĵoj.

**Feliĉan Printempon!**

*David Thornell*

